

**Redakta Komitato:** D-ro A. Albault, M. Ĝivoje, Prof. J. Görlich,  
D-ro P. Neergaard, Prof. B. Popović, Prof. S. Reiersöl, C. Stöp-Bowitz.  
**Ĉefa kaj respondeca redaktoro** Prof. B. Popović, Teknika fakultato,  
NIŠ, Jugoslavio

**Lingva kontrolanto** Prof. M. Šaponjić, Svetosavska 23/I,  
BEOGRAD, Jugoslavio

Eldono de **INTERNACIA SCIENCA ASOCIO ESPERANTISTA**  
Aperas kvarfoje jare. Jarabono 30 steloj = 7,5 Ned. glđ. = 2,2  
dol. = 25 N. Din

Por membroj de I. S. A. E. la jarabono 25 steloj (la jarkozito 10 steloj)  
La abonajn kolektas la landaj delegitoj de ISAE  
(La listo troviĝas sur la lasta kovrilpaĝo)

Izdaje nauĉna sekcija Saveza esperantista Jugoslavije, Dobrinjska 12,  
Beograd (=jugoslovenska podružnica Međunarodnog nauĉnog društva  
esperantista). Za izdavaĉa: odgovorni urednik Prof. Dr. Bož. Popović,  
(Tehniĉki fakultet, Niš)

Ŝtampano u Grafiĉkom preduzeću »ŠTAMPA«, Sarajevo; za ŝtampariju  
Simo Bunĉić.

# SCIENCA REVUO

UDK 001 (05) = 408.92  
Vol. 18  
N-ro 1 (69)  
20. 2. 1967.

Aperas kvarfoje jare. Jarabono 30 steloj = 2,2 us. dol. = 25 N. Din

## Enhavo

- A. Lienhardt:** Esperanto — ĉu klara lingvo?  
**G. Waringhien:** La Budapesta skolo  
**J. Chvosta:** Historio de latina alfabeto  
**M. Kossakowski:** Kalkulado de vojtrafika intenseco  
**C. Sirbu:** Pri la enkonduko de kolora televido  
**S. Boev:** Pri la cirkulado de triĥineloj

= 408.92:406+411

## ESPERANTO — ĈU KLARA LINGVO?

(A. Lienhardt, Mulhouse, Francio)\*

En la numero 59/60 (Majo 1965) de SCIENCA REVUO EN ESPERANTO aperis tre atentinda artikolo de K. G. LINTON, titolita »La gvidata evoluo de Esperanto«. Tiun artikolon inspiris la pli kaj pli akra bezono disponi pri konvena »intera lingvo« por elektronikaj tradukaparatoj (komputoroj, ordinatoroj). Ĉar, principe, la lingvo planita fare de ZAMENHOF posedas la necesajn kvalitojn por ludi la rolon de la bezonata »intera lingvo«, ni devas dediĉi apartan atenton al tiu urĝa kaj grava afero.

K. G. LINTON klar-maniere pritraktis en sia artikolo la demandojn pri la **vort-karakteroj** kaj la **vort-pureco** en Esperanto. Lia bibliografia libro-listo povus enhavi, aldone, la studaĵon »Raciaj derivaĵoj kaj verb-uzoj« de Emile GASSE (1964, ĉe HEROLDO DE EO),

\* 24, Fbg de Riedisheim, MULHOUSE (Ht-Rhin), Francio.

pri kiu recenzoj aperis diversloke, i. a. tiu — tre rimarkinda — de M. DUC GONINAZ en FRANCA ESPERANTISTO n° 233/1965. (Notinda estas ankaŭ la ĝustigo el la plumo de E. SONNENFELD, aperinta en SCIENCA REVUO n° 63/64 — Marto 1966, pri la signifo de »adjektiva radiko, kiam uzata kiel verbo«).

Sed, kiam oni konsideras la koncernan temon en pli larĝa optiko, oni konstatas, ke la du demandoj laŭ K. G. L. devas esti enskribitaj en la kadron de demando pli ĝeneral-cela, kiu formas la titolon de ĉi tiu artikolo. Al tiu demando, kelkaj legantoj eble respondos anticipe: Tio dependas tutsimple de la intelektaj kaj lingvaj kapablecoj de la uzantoj de Esperanto! Tial estas necese formuli le demandon en la jena maniero, pli preciza: Ĉu Esperanto, **tiel kiel ĝi ĝenerale estas uzata**, estas klara lingvo? Ĉi tiun demandon oni ne nepre povas jesi, kiam oni legas iom grandan parton de la publicaĵoj (libroj, gazet-artikoloj) aperintaj kaj aperantaj en Eo. Atenta analizo montras, ke multaj Eo-tekstoj ne estas plene klaraj pro misa apliko de la reguloj pri la **lingvo-stilo** kaj la **kompleksaj vortoj** (vort kunmetaĵoj, kunmetitaj vortoj). Jen, pri tiuj du punktoj, kelkaj rimarkoj:

I) La **lingvo-stilo en Esperanto** postulas ĝistundan lernadon, same kiel la gramatiko kaj la vortaro. Kiam iu aŭtoro senpripense uzas sian tradician nacilingvan stilon, tiam alilingvaj legantoj — kies propra lingvo-stilo diferas — havas penon por kompreni kaj ofte devas plurfoje relegi la tekston. Jen tipa ekzemplo el aktuala libro de A. PETTYN, pola instruisto (sen kritiki, per tio, la valoron de la libro mem): »Tiun ĉi broŝuron ni eldonas kiel helpmaterialon por la partoprenantoj de la okazantaj en Varsovio kursoj por Esperanto-instruistoj, kaj por la personoj interesiĝantaj pri la instruado de Esperanto.« La jena fraz-formo estas pli rapide komprenebla por multaj ne-polaj legantoj (kaj ankaŭ por aŭtomata traduk-aparato): »Ni eldonas ĉi-tiun broŝuron kiel helpmaterialon por la partoprenantoj de la kursoj, okazantaj en Varsovio, por Esperanto-instruistoj — kaj ankaŭ por ĉiuj personoj, kiuj interesiĝas pri la instruado de Esperanto.« — Koncerne tiun punkton, mi ne povas fari pli bone ol citi parton el la recenzo de R. BERNARD (vidu en REVUO ESPERANTO n° 720) pri la rekomendinda libro de F. FAULHABER: »Ne tiel, sed ĉi!«, libro, kiu donas praktikajn konsilojn por akiri bonan Esperanto-stilon:

»La gvidantoj de Esperanto-kursoj penas instrui le esencon de la lingvo, ĝian gramatikon, ĝian vortaron, kaj ĝenerale la manieron, kiel korekte ĝin skribi kaj paroli. Estas ja ankaŭ programo de tiuj

kursoj montri, kiel eviti la transplantadon, en Esperanton, de naciaj esprimmanieroj. Sed mi kredas, ke tre malofte, kaj eble preskaŭ neniam, oni donas instruon pri la stilo. Kompreneble, en kiu ajn lingvo, akiro de bona stilo estas la lasta atingota grado en la alproprigo de la koncerna lingvo. Por Esperanto tute ne ekzistis, mi scie, ia gvidilo por tiu celo. La verko de s-ro FAULHABER rimedas al tiu manko.«

Tamen oni ne povas ne konstati, ke tiu laŭdinda libro ne estas tute sen mankoj, almenaŭ rilate al la interpunkcio; espereble la dezirindaj plibonigoj aperos en la dua — kaj pluaj — eldonoj.

Efektive la **interpunkcio** estas ne malofte neglektata fare de Eo-verkistoj, eĉ elstaraj, kvankam ĝi estas ne-malhavebla helpilo por doni maksimuman klarecon al la lingvo-stilo. Je nur supraĵa alrigardo oni povus opinii, ke ne estas gravege, se iufoje mankas komo, aŭ punktokomo, aŭ punkto, aŭ streketoj, aŭ parentezoj, aŭ aliaj interpunkciaj signoj. Tamen, estas ekster-diskuta fakto, ke ĝusta interpunkcio multe faciligas la legadon — do ankaŭ la komprenon — tiel same al novaj uzantoj de la lingvo, kiel al malnovaj (kaj al aŭtomataj traduk-aparatoj). Sed, kromĉ, povas okazi ke, pro mankantaj signoj, la frazo povas enhavi du diversajn sencojn. Jen simpla ekzemplo: »La knabo petis panon manĝante pecon da ĉokolado.« Ĉar tute mankas interpunkcio en tiu frazo, oni inklinas kompreni: »La knabo petis panon, manĝante pecon da ĉokolado.« Sed kiam oni metas du komojn, la senco de la frazo estas tute alia: »La knabo petis, panon manĝante, pecon da ĉokolado.« En la ĉi-lasta frazo, la intera propozicio (»panon manĝante«) povus esti metita ankaŭ je la komenco aŭ je la fino, sen aliigi la sencon de la tuta frazo. Resume: Ne estas celata postuli tro abundan interpunkcion, sed rekomendi striktan aplikadon de la fundamentaj reguloj tiurilataj, troveblaj en la »Plena Gramatiko de Esperanto« de K. KALOCSAY kaj G. WARINGHIEN. (Nova eldono aperis antaŭ nelonge.)

II) La **kompleksaj vortoj** meritis aparte detalan studon, pli detalan ol estas eble fari en la kadro de ĉi-tu artikolo. La fakto, ke la ĉapitro »Vort-farado« ampleksas 130 paĝojn en la »Plena Gramatiko«, estas multsignifa pri la graveco de tiu aspekto de nia lingvo. Al tio kion alportas la ĵus menciita ĉapitro, mi volonte aldonus la rimarkojn:

a) Kompleksaj vortoj — precipe novaj aŭ malofte uzataj — ne ĉiam estas tuj analizeblaj fare de novuloj kaj eĉ malnovuloj (same kiel de aŭtomataj traduk-aparatoj) se mankas klariga helpsigno diŝiganta la ĉefajn vort-elementojn. Oni do evitu unu-pecajn kompleksajn vortojn kiel, ekzemple, **lingvouzo**, **provovojaĝo**, **oleoekflamiĝo**, **karbonatpurigado**, **malvarmummalsanoj**, **pasaĝerelirejo**, k. a., sed prefere

skribu **lingvo-uzo**, **provo-vojaĝo**, **oleo-ekflamiĝo**, **karbonat-purigado**, **malvarmum-malsanoj**, **pasager-elirejo**, k. t. p. En tiu koncerno mi atentigas pri la artikolo »Por facile kompreni fak-terminojn en Eo« (aperinta en SCIENCA REVUO n° 53-54/Feb. 1964.) kaj la tiurilata artikolo »Pri kelkaj traduk-problemoj« en cirkularo BV n° 1/1965. de R. EICHHOLZ (Cardiff, Kanado), iniciatinto de Eo-traduko de DUDEN-Bildvortaro.

b) Dum parolado, kompleksaj vortoj devas esti ĝusta-maniere prononcataj, por ebligi tujan komprenon precipe kiam temas pri nekutimaj terminoj. En la »Plena Gramatiko de Esperanto« (1938) oni legas i. a. (§5.4): En silaboj eksakcentaj (t. e. akcenta silabo de flank-elemento, kiu perdis sian akcenton, ĉar ĝin senpere sekvas la akcenta silabo de la ĉef-elemento) oni uzu longajn vokalojn.

Jen kelkaj tipaj ekzemploj de kompleksaj vortoj, en kiuj la prononco de la longaj vokaloj en la eksakcentaj kaj akcentaj silaboj estas figurita ĉi tie per dupunkto (:), kaj la akcenta silabo, krome, per **grasaj literoj**:

- 1) **ankroloko** = ankro-loko (prononcu »a:nkro / lo:ko«; do ne »ankroloko« simile al »artiŝoko«!)
- 2) **martestudo** = mar-testudo (pron. ma:r / testu:do«; do ne »martestudo« simile al »longitudo«!)
- 3) **komercagento** = komerc-agento (pron. »kome:rc / age:nto«; do ne »komercagento« simile al »medikamento«!)
- 4) **interprethelpilo** = interpret-helpio (pron. »interpre:t / helpi:lo«; do ne »interprethelpilo« simile al »operaciilo«!)
- 5) **sunvarmo** = sun-varmo (pron. »su:n / va:rmo« simile al G Uhr/zeiger aŭ A work/people; sed ne »suvarmo«, simile al »ĝendarmo«!)
- 6) **somertago** = somer-tago (pron. »some:r / ta:go« simile al G Kanal/brücke aŭ A advance/money; sed ne »somer-tago« simile al »asparago«!)
- 7) **pendvojrlo** = pend-voj-relo = pendvoj-relo (pron. »pe:nd / vo:j/re:lo« simile al G Gross/raum/Flugzeug aŭ A world/wide/clipper; sed ne »pendvojrlo« simile al »mirabelo«!)

c) Kompleksaj vortoj ofte estas malklaraj por homoj, kies nacia lingvo ne havas aglutinan strukturon. Francoj kaj angloj preferas »olea kuvo« (pli precize »por-olea kuvo«) al »oleo-kuvo«, kiun siaflanke preferas germanoj kaj slavoĵ. Sed, tute ekster tiu prefero, situas la

postulo pri absoluta senc-klareco. Ĉu, ekzemple, »infan-desegnaĵoj« estas desegnaĵoj de infano(j) — t. e. apartenantaj al infanoj — aŭ fare de infano(j) aŭ pri infano(j)? En tiu aparta kazo eble ne estas dubo pri la senco, pro la jam tradicia uzo de tiu kompleksa vorto (F dessins d'enfants, G Kinderzeichnungen, ktp.). Jen kelkaj iom pli frapaj ekzemploj, ĉerpitaj el diversaj fontoj: **bierbotelo** (= bier-botelo, botelo por biero, por-biera botelo) kaj **botelbiero** (= botel-biero, biero en boteloj, en-botela biero); **salvenenado** (= sal-venenado, uzata en la scenco de »venenado pro tro alta sal-enhavo«!), **evolulandoj** (= evolu-landoj: ĉu »evolu(int)aj landoj aŭ »sub-evolu(int)aj landoj« aŭ »evoluontaj landoj«?); **amasatakoj** (= amas-atakoj; ĉu »atakoj kontraŭ amasoj aŭ »atakoj fare de amasoj« aŭ »ago amase ataki«?); **(malsanprilukto** (= malsan-prilukto; ĉu »luktado kontraŭ malsanoj? profilaktiko!), **bolkuirita rizo** (= bol-kuirita rizo; rizo kuirita en bolanta akvo; bol-akva rizo); **purturkigi la lingvon** (en la senco de »igi la lingvon pure turka«! — —); **vortgastoj** (= vort-gastoj, anstataŭ »gast-vortoj«, F mots d'emprunt, G Gastwörter; en »Revuo Esperanto« n°726, p. 82 kaj 83); ktp. Tiaj ekzemploj, same kiel la jam klasikaj **paperkorbo** (korbo por papero), **paperskatolo** (skatolo el papero), **papermilito** (milito per papero), **paperformato** (formato de papero) trafe montras, ke kompleksaj vortoj ne estas absolute klaraj »per si mem«; sekve en dubaj kazoj estas konsilinde rezigni pri ili kaj esprimi iujn nociojn per du aŭ pluraj vortoj laŭeble simplaj (aŭ eventuale indiki, inter parentezoj, la dispartiĝon de la kompleksa vorto, se oni ne volas rezigni pri ĝi).

d) La »mal«-vortoj (t. e. vortoj faritaj helpe de la prefikso »mal-«) reprezentas apartan ĉapitron pri kompleksaj vortoj, kiu fluigis jam multan inkon kaj urĝe postulas ĝisfundan esploron kaj oficialan deklaron. La »mal«-vortoj estas zorge pritraktitaj i. a. en § 9 de la libro de F. FAULHABER kaj en § 142 de la »Plena Gramatiko«. Al tio, kio estas dirita tie, mi aldonas la jenan komenton (ne inspiritan de literaturaj konsideroj):

Ankaŭ en etnaj lingvoj (ekz-e la franca, la germana, la angla) ekzistas »mal«-vortoj kun specialaj prefiksoj; sed ĝenerale, tiuj vortoj esprimas ion malbonan, malbelan, malagrablan, malŝatatan, do : la kontraŭon de io bona, utila, ŝatinda, k. s. Se ni prenas franclingvan vortaron, kaj sinsekve elskribas ĉiujn tiajn vortojn, ni povas starigi sisteman vortliston, ekzemple : **maladroit** (mallerta), **malaisé** (mal-komforta), **malchance** (malbon-ŝanco), **malheur** (malfeliĉo) ktp; krome: **mécontent** (malkontenta), **méfiance** (malfido), **mépris** (malestimo), ktp; krome : **inabordable** (malatingebla), **inacceptable** (malakceptebla), **inactif** (malaktiva), **incapable** (malkapabla), **incommode** (malkomoda),

ktp. Prenante germanlingvan vortaron, ni trovas : ungeschickt (mallerta), unbequem (malkomforta), unglücklich (malfeliĉa), unehrlich (malhonesto), unsauber (malpura), ungesund (malsaniga), ktp; krome : missvergnügt (malkontenta), missachten (malestimi), ktp. Prenante anglalingvan vortaron, ni trovas : unable (malkapabla), unaccommodating (malcedema), unadvised (malprudenta) unamiable (malafabla), unapt (maltaŭge), ktp... Kiam, en Esperanto, oni limigas la »mal«-vortoj al tiuj, kiuj elvokas ion nete malagrablan aŭ malŝatindan, tiam nia lingvosento ne sentas sin kontraŭita. Sed se, krome, ni allasas vortojn — ni diru — »neŭtralajn« (ekz-e akuzi, fermi, kovri, supreniri) kaj formas la kontraŭon per »mal-«, tiam forestas la dezirinda elvokiveco. Laŭ tiu kriterio, nenio estas direnda kontraŭ la klasikaj esprimoj (sur p. 56 de la libro F. F.) : malforta, maljuna, mallaborema, malbela, malfrua, malgracia, malriĉa, malĝoja malutila. Kaj samsece, la jenaj neologismoj estas defendeblaj : basa (malalta), dura (malmola), frida (scienca termino anst. malvarma), lanta (malrapida), streta (mallarĝa), poka (malmulta), k. a. Konvinkan bildon pri mankanta elvokiveco oni ricevas per la jenaj simetriaĵoj ekzemploj : seka (malhumida) kaj humida (malseka), fermi (malaperti) kaj aperti (malfermi); ni komparu ĉi tiujn kun la zamenhofaj komenci (malfini) kaj fini (malkomenci)!

**Konklude mi proponas**, ke la diversaj demandoj cele al »maksimume klara Esperanto« estu studataj fare de Lingva Komitato, restarigota per decido de la Akademio de Esperanto. La membraro de L. K. konsistu en membroj de la Akademio kaj, eventuale, kelkaj al-elektitaj kunlaborantoj sufiĉe kompententaj. La oficialigo de la decidoj de L. K. apartenu, kiel ĝis nun, al la Akademio mem.

8(091) : 894.511 = 408.92

## LA BUDAPESTA SKOLO

(G Waringhien, Vitry, Francio)

— prelego en Internacia Somera Universitato, Budapeŝto, 1966. —

Por bone kompreni kaj analizi la fenomenon »skolo«, estas necese memori pri la origino de la vorto. La greka etimo »sĥolés« signifis propre »senokupeco« kaj iom post iom aplikigis al la filozofiaj konversacioj aŭ diskutoj, per kiuj la plej scivolemaj spiritoj de la antikveco plenigis tiun liberan tempon; la Romanoj, pruntinte la terminon, parolis pri la platona skolo, la stoika skolo, la epikura skolo ktp. La mezepoko konis la diversajn skolojn de teologoj — la plej fama lasis eĉ sian reziduon en la »skolastiko« — kaj la moderna epoko la diversajn skolojn de sociologoj, de la liberalismo ĝis la historia materialismo. En tiu propra senco, unu skolo havas ĉe sia kapo pensulon, kiu elmetas sistemon sufiĉe novan, koheran kaj ampleksan, por unue akiri la konsenton de kelkaj kleruloj, kaj poste lasi al ĉiu el ili la eblon apliki la saman metodon aŭ la samajn principojn al aliaj studkampoj; sed inter la iniciatoro kaj la sekvantoj ne ekzistas necese komuneco de tempo (la tomismo de la 13a jarcento havas ankoraŭ nun adeptojn) nek de loko (Heidegger, Jaspers aŭ Sartre neniam bezonis kunveni, por fondi la ekzistencialismon).

Jen de kia kunteksto la arthistoriistoj elprenis la vorton, por uzi ĝin en sia fako. Sed en tiu ĉi nova tereno, ĝi ricevis plian specifecon. Ĉar la pikturo esence reflektas la manieron, kiel la okulo de la artisto impresigas de la ĉirkaŭanta medio, de ĝia ĉiellumo, de ĝiaj pejzaĝoj, de ĝiaj vivaspektoj, la vorto skolo alprenis pli strikte